



star^{to}

ELDONAS ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



1979 · 1 · (71)



BRALEN LD POLYETHYLENE

TATREN POLYPROPYLENE

ETHYLENE GLYCOLS

PRODUCER : SLOVNAFT-BRATISLAVA-ČSSR

EXPORTER : CHEMAPOL-BRATISLAVA-ČSSR



SUKCESA BILANCO

Ĉeĥa Esperanto-Asocio en tiuj ĉi tagoj fariĝas dekjaraĝa. Kaj ĝian trian kongreson en Prago (inter la 10-a - 11-a de februaro) oni povas konsideri certgrade bilanco de tiu ĉi periodo. Dum tiam, plej precipe en la lastaj ses jaroj, ĈEA konsiderinde plifirmiĝis laŭstrukture kaj ekonomie. Tio respeguliĝas en pli glata plenumado de ĉiutagaj kaj perspektivaj taskoj, kies nombro ĉiam kreskas.

Vastiĝas la relo de l' Asocio en la socia agadsfero. Tion dokumentis ankaŭ ĉessto de oficialaj reprezentantoj de kulturministerio (Vaňková), Ĉeĥa Packonsilio (Břinčilová), filatela ligo (Ing.Sůva) kaj Svazarm Třebíč (Dvořák), kiuj salutis la III-an kongreson.

—VÝZVA MÍROVÉ SEKCE—

Mírová sekce Českého esperantského svazu (MEM) vyzývá všechny místní skupiny ČES a jejich zřizovatele, aby všemožně projevíly svoji solidaritu s bojem vietnamského lidu proti čínským agresorům, a to nejen odesíláním protestních rezolucí, ale i praktickou pomocí, zejména:

- 1) Pořádáním besed solidarity za účasti občanů VSR,
- 2) Promítáním filmů zapůjčených od velvyslanectví VSR v Praze,
- 3) Organizováním peněžních sbírek na konto solidarity s vietnamským lidem.

Věříme, že naše výzva nalezne v řadách esperantistů a příznivců hnutí co nejširší ohlas a že přinese žádoucí výsledky.

Za výbor sekce:
D.Kočvara, předseda

V souvislosti s čínskou agresí proti VSR Český esperantský svaz zaslal Vietnamskému svazu esperantistů obránců míru v Hanoji dopis, v němž ujišťuje vietnamské esperantisty svou plnou podporou a solidaritou.

Pli kaj pli evidentiĝas en nia anaro la konscio, ke enfermita agado estas anakronismo kaj malhelpo por aplikadi la Internacian lingvon en ĉiuj sferoj de la vivo kaj informi la publikon pri ĝiaj celoj. Kunlaborade kun diversaj organizoj kaj institucioj firmiĝas ĉiuflanke ankaŭ la poziciojn de la Esperanto-asocio.

Vastiĝas niaj rilatoj kun la internacia movado. Unuafefe en la historio de ĈEA salutis kaj partoprenis la kongreson reprezentanto de Universala Esperanto-Asocio, ties estrarano d-rino Flóra Szabó-Felső. En la nomo de d-ro I. Pethes, la prezidanto de MEM, salutis D. Kočvara. Plue salutparolis la reprezentantoj de Bulgara Esperanto-Asocio (Papazov), Centra Laborrondo de Esperanto en GDR (Linke), Hungara Esperanto-Asocio (d-ro Maté), Pola Esperanto-Asocio (Uspiński), Kroata Esperanto-Ligo (Pehar) kaj la prezidanto de Asocio de esperantistoj en Slovaka socialisma respubliko inĝ.M. Zvara.

La delegitoj aŭskultis raportojn de la asocia estraro kaj sekretario, pri la agado de post la II-a kongreso en 1976, kiujn legis J. Vitek kaj Z. Křimský kaj tiun de Kontrolo kaj revizia komisiono, kiun tralegis V. Špür. Oni elektis la novan centran komitaton kun d-ro Jaromír Jermář kiel prezidanto, kaj aprobis agadprogramon de ĈEA por la jaroj 1979-1981. Diskutado tuŝis ĉefe la fakajn temojn. Pluraj membroj estis honorigitaj per diplomoj pro sia aktiva kaj longjara Esperanto-agado. Laboran programon de la kongreso variigis kulturaj kaj amuzaj eroj. Pri tiuj ĉi punktoj ni informas pli detale aparte.

Antaŭ la kongresa fermo estis aprobita rezolucio kaj salutleteroj al CK KPC kaj ministerio de kulturo.

Partoprenis la kongreson 104 delegitoj, 149 enlandaj kaj 19 eksterlandaj gastoj kaj grupo de junaj esperanto-turistoj el Pollando, sume pli ol 320 personoj. Dank'al la asocia sekretario kaj volontuloj de la praga klubo ĉiuj organizaj taskoj estis solvitaj perfekte.

Pri la kongresaj traktadoj aperis informoj en la gazetar, radio kaj televido.



Asociaĵ kongresoj estas ĉiam eventoj, dum kiuj la pulso de la movado estas speciale sentebla. La III-a kongreso de ĈEA ne estis escepto. Tion montras kelkaj bildoj de M. Labasja - el ties riĉa mozaiko: Saluti la kongreson i.a. reprezentantino de kulturministerio L. VANKOVÁ (supre de maldekstre) kaj d-rino Flora SZABO-FELSO por ŬEA; kunvenas la nova komitato de ĈEA; la novaj honoraj membroj de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Per kulturaj eroj kontribuis al la programo la kolektivo de E. SEEMANOVÁ. Sukcese agadis en la kongresaj tagoj ankaŭ la asocia libroservo.





ESTRARANOJ DE ĈEA

La nova prezidanto de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, d-ro Jaromír JERMÁR, CSc (1922) estas gvida scienca laboranto de Instituto por filozofio kaj sociologio de Ĉs, akademio de sciencoj en Prago. Publikigis studaĵojn pri la etna kaj nacieca problemoj. En la jaroj 1959 - 1965 li estis prezidanto de Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato (ĈSEK), ekde 1969 komitatano kaj en la lastaj jaroj estrarano de ĈEA kaj estro de ties komisiono por interlingvistikaj esploroj.



Inĝ. V. KOČVARA,
1a vicprezidanto



V. PODHRADSKÁ,
2a vicprezidantino



Z. KŘIVSKÝ,
sekretario



E. DADÁK,
estrarano



J. NOVÁK,
estrarano



St. PAPIRNÍK,
estrarano

KOMITATANONJ DE ĈEA



O. BAREŠOVÁ



Inĝ. V. HBEDA



J. KLEMENT



D. KOČVARA



V. KOSTEČKOVÁ



Ing. L. KOVÁŘ



K. MAUZIA



P. PISK



L. RYZNAR



P. SITTAUER



P. STANĚK



Ing. M. STRNADOVÁ



MUDr. VL. ŠKODA



V. ŠPÖR



J. VÍTEK



V. VÍTEK



J. VONDRÁKOVÁ



J. VYCHODIL

**CENTRA
KONTROLA
KAJ
REVIZIA
KOMISIONO**



JUDr. Z. RUSÍN,
prezidanto



J. RYBÁČKOVÁ,
membro



M. TURKOVÁ,
membro



S. PUSTKOVÁ,
vicmembro



V. PROCHÁZKA,
vicmembro



LAKO NITROCELULOZA
POR FLEKSA DA MEBLO

C 1016



Chemotak

NÁRODNÝ PODNIK

S M O L E N I C E

7111

Mi povas sincere emfazi, ke la 3-a kongreso de ĈEA estis unu el la plej bone organizitaj landaj kongresoj de esperantistoj. Ĝi respegulis por mi la bone planitan kaj organizitan agadon de la ĉeĥaj esperantistoj. Lau la raportoj kaj programaj dokumentoj kaj ankaŭ lau la diskutoj montrigis, ke ĈEA bone realigas sian gvidlinion celantan aligon de la pozicio de la Esp. movado en la ĉeĥa socio kaj ĝia socialisma konstruado. Mi estas konvinkita, ke sub la gvido de la novelektita estraro prezidata de la elstara sciencisto kaj esperantisto d-ro J. Jermář ĈEA atingos pliajn sukcesojn, kiuj kontribuos al levado de la socia prestiĝo de la landa kaj internacia E.-movado.

J. Uściński, PEA, Varsovio

JULIUS FUČÍK KAJ ESPERANTO

Antaŭ tridek ses jaroj verkis en la nazia malliberejo "Raporton skribitan sur la pendumila maso" ĉeĥa ĵurnalista Julius FUČÍK. La verko de tiu ĉi nacia heroo famigis dum postmilitaj jaroj en pli ol sepdeko da lingvoj. Ĝian tradukon en Esperanton entreprenis antaŭ dudek ok jaroj la konata R. Hroŝada. Tamen nur en tiu ĉi jaro venis la tempo por aperigi ĝin - kiel sisteme iniciatis la japana bohemiŝto kaj esperantisto Kei Kurisu.

De Gusta Fučíková, ni tiuokaze ekscii pri la rilato de ŝia edzo al internacia lingvo. Julio, kiel ŝi diris, ĝian aprobe rilatis al tio, ke inter la laboristoj venantaj el okcidentaj landoj al Sovetunio por partopreni tie la unuamanĝan feston, estas ankaŭ la parolantoj de Esperanto, kaj tio ebligas al ili pli bone konatigi kun la socialisma socio.

Dum sia restado en Sovetunio (1933 - 1936) Fučík estis entuziasme preparanta romanon pri la Interhelpo, kooperativo, kiun fondis en 1925 la adeptoj de IL. Pri lia starpunkto al Esperanto povas atesti ekzemple, ke en la gazeto Tvorba de li redaktata, aperis komence de la tridekaj jaroj tutpaga aŭto-alvoko de la sovetaĵ esperantistoj omage al la 1-a de majo.

(kni)

Ĉeĥa Esperanto-Asocio dankas pro la multnombraj bondeziroj de siaj membroj kaj eksterlandaj amikoj okaze de la nova jaro. Aparte ĝi reciprokas tiujn de la Asocio de esperantistoj en SSR, Vjetnama Pacdefenda Esperanto-Asocio, de la reprezentantoj de la soveta movado M. Isaev kaj Berjoza, Samarkanda Esperanto-Klubo, Esp. societo en Polski Trumbeŝ, de Bulgara Esp.-Asocio, Hungara Esp.-Asocio, Korea Esp.-Asocio, kaj de la jugoslavia gazeto Voco.

DUOBLIĜU NIAJ ATINGOJ

Kvankam ideoj de elementa justeco enpenetris diversajn aspektojn de la homa vivo, ili ne enpenetrigis ĉiujn. Bazaj principoj de raso, egaleco estas hodiaŭ large akceptitaj, ĉe se ili ne estas ĉiam aplikataj. Vastigas principoj de seksa egaleco, kaj de religia. Sed, la lingva egaleco ankoraŭ postrestas. Diskriminacio kontraŭ homoj nur pro la lingvo, kiun ili parolas, estas tre ofta hodiaŭa fenomeno. Ĉe la grandaj internaciaj organizaĵoj aplikas lingvan diskriminacion en la propra laboro kiam ili favoras certajn lingvojn kaj malatentas aliajn. En sia insistado pri lingva egaleco, Universala Esperanto Asocio laboras por severe neglektata aspekto de la homa justeco, kiu estas eksplicite menciita en la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj.

En la morgaŭa mondo la simplaj fizikaj bezonoj, la interrilato de la monda ekonomio, la denseco de la homa komunikado - ĉio ĉi igos la diversajn naciojn ne plu sendependaj sed interdependaj. Tiu epoko jam alvenadas. Por konservi la diversacon de la kulturoj, la diversajn alirojn al la homaj felico kaj justeco, oni bezonas homan komunikilon, kiu ne favoras unu nacion super alia sed traktas ĉiujn egalaj. Oni bezonas lingvon, kiun oni povas lerni relative facile, sed kiu kapablas esprimi ĉion lingve esprimeblan. Oni bezonas lingvon, kiu povas ligi la ordinariajn civitanojn de la mondo, do ne nur la elitojn, per senpera ligiloj.

La morgaŭa mondo povus enteni la promeson de tutmonda lingva komunikado por ĉiu civitano. La Internacia Lingvo Esperanto estas la hodiaŭa garantio de tiu morgaŭa ebleco. Por lokaj kaj naciaj bezonoj ni uzu lokajn kaj naciajn lingvojn; ja ĉiu lingvo havas sian rolon. Sed por internacia komunikado ni uzu unuavice la efikan kaj jam elprovititan Internacian Lingvon. Ĝi ne forigu la naciajn lingvojn, sed konservu ilin en nova lingva ordo.

Necesas, ke la jamaj parolantoj de Esperanto kune laboru en konscia harmonio por alporti al pliiĝo da homoj tiun ĉi modernan miraklon de la komunikado. Ni ĉiuj havas niajn diversajn alirojn al mondaj problemoj, al politiko, al sociaj demandoj, ĉe al persona filozofio - sed unuigas nin la lingvo, kiun ni parolas. Tio estas potenca kaj nedisigebla ligilo.

La jaro 1979 estas promesplena jaro. Esperanto kaj la laboro por Esperanto intensigas, firmigas, kaj - eble plej grave - disvastigas vere tra la tuta mondo. La atingoj de 1978 daŭru kaj duobligu tra 1979. Tio okazos, se ni tenos nin firme je la celo kaj en ĉiuj niaj rilatoj kun aliaj homoj ne forgesos tiun celon - la senperan, egalecan, internacian lingvan komunikadon.

Humphrey Tonkin

ĈU LA VIRINA KOMISIONO FUNKCIOS? _____

La VIII-a konferenco de MEM en Varna elektis la novan Internacian Komitaton kaj novajn gvidantojn de la komisionoj, inter

La VIII-a konferenco de MEM en Varna elektis la novan Internacian Komitaton kaj novajn gvidantojn de la komisionoj, inter ili ankaŭ de la virina. Ĝia celo laŭ la artikolo 6/e de la Statuto de MEM estas:

- instigi la esperantistinojn komune batali por la pago,
- instigi la landajn sekciojn de MEM elekti virinon au se eble virinan komitaton, kiu kunlaborus kun la virina komisiono de MEM,
- okazigi kontaktojn kaj kunlaboradon kun virinoj internacie kaj kun porpacaj organizoj kaj ties landaj sekcioj,
- organizi internaciajn kontaktojn kaj renkontojn inter virinoj.

Interesintinoj aliĝu senprokraste ĉe la gvidantino de la virina komisiono de MEM, Maria TURKOVÁ, Vrchlického strato 7, CS - 320 29 Plzeň, Ĉeĥoslovakio.

KIU TRADUKIS KION

Respondon al tiu ĉi demando atendas Ĉeĥa Esperanto-Asocio de ĉiuj, kiuj disponas pri la ĝis nun nepublikigita(j) traduko(j) el la ĉeĥa literaturo - beletra au sciencna - au kiuj estas tradukantaj tiajn verkojn. Por povi laŭplane eldonadi estas grave scii tion. Precipe nun, kiam la Asocio lanĉas preparaĵojn por ĝidono de la antologio de la moderna ĉeĥa literaturo en Esperanto. Tiurilate nin interesas precipe la aŭtoroj de la lastaj seg - sep jardekoj. Bv. do sendi kopion de Via(j) traduko(j) au almenaŭ atentigi pri ties ekzisto kaj amplekso. Eble ne necese akcenti, ke la tradukoj devas esti maksimume bonkvalitaj.

--Z komise mládeže--

Česká esperantská mládež letos vstoupila do mezinárodní mládežnické esperantské organizace TEJO. Věříme, že to bude mocným impulsem ke zvýšení její aktivity v kroužcích. Prvním předpokladem je, aby všichni zaplatili včas členské příspěvky a to alespon v kategorii B (30.-- Kčs), abychom je mohli do TEJO nahlásit a dokázat tak, že esperantskou mládež doopravdy máme. Dalším předpokladem je, že se mladí esperantisté (i ti, kteří se cítí mladí), at už pokročili nebo začátečníci, budou hlásit do aktivu spolupracovníků Komise mládeže a podílet se na naší činnosti. Zájemci mohou žádat informace na adrese: Olga SITTAUEROVÁ, Znojemská ul.č. 1128, 674 01 Třebíč.

INFORMOJ EL »MONDO KAJ LINGVO« ■■■■

Ni diskutu la pliigantajn lingvajn problemojn de la internacia fremdultrafiko! Estu ni iniciatintoj de la internacia solvo. Per tiuj ĉi titolo kaj subtitolo oni enkondukas la malfermitan leteron de kelkaj hungaraj publikaj agentoj direktitan al turismaj oficejoj, gastigaj kaj trafikaj organizoj. Ĝi aperis en pluraj sindikataj kaj fremdultrafikaj gazetoj kaj en la lastjara numero de la dumonata VILAG ES NYELV (Mondo kaj lingvo, antaŭe Eszperanto Magazin). Tiu ĉi unika gazeto jam de kelkaj jaroj sisteme informas la hungaran publikon pri la problemoj de multlingveco kaj de ties solvo, montrante avantaĝojn de la neutrala planlingvo Esperanto. Sur ĝiaj paĝoj antaŭnelonge respondis pluraj hungaraj sindikatestroj koncerne la iniciaton de la brita grupo por akceptigo de Esperanto en la sindikata kaj kooperativa movado (TU-CEG). Hungara Esperanto-Asocio meritas pro la eldonado de la gazeto moralan subtenon de ĉiuj esperantistoj.

MALMULTEKOSTE AL SET

Dum julio kaj aŭgusto jam la 27an fojon estos organizata en tri etapoj (I: 1.-14.7., II: 15.-28.7., III: 29.7.-19.8.) kaj en la bela sudmoravia pejzaĝo la Someĝa Esperanto-Tendaro Lančov. Ĉiuj etapoj estas dusemajnaj, kies komenco estas dimanĉo. La tendaranoj logas en tendoj aŭ kabanaroj, mangado kvinfoje potaĝe. Antaŭtagmeze instruado de Esp.-o en kursoj por komencantoj, progresintoj, por konversacio, por instruantoj, ev. aliaj specialaj kursoj. Estas kvar instruhoroj kaj lecionoj de kantado. Posttagmeze sportoj, ludoj, ekskursoj, banaĉo ks. Post la ekzamenoj la kursanoj ricevas diplomojn. La tendaro estas relative malmultekosta, ĉar la tendaranoj plenumas mem iujn devojn kaj obeas la disciplinon partoprenante en la lernado. Ne hezitu kaj aligu, ĉar la nombro por ĉiu etapo estas limigita. Pli detalaj informoj kaj aligiloj ĉe: Esperanto, p.k. 72, 674 01 Třebíč, ĈSSR.

Jiŝ po sedmadvacáté se pořádá v červenci a srpnu 1979 letní esperantský tábor Lančov po dvou týnech ve třech etapách (I: 1. - 14.7., II: 15. - 28.7., III: 29.7. - 11.8.) s dopolední výukou esperanta pro začátečníky, pokročilé, konverzaci, výuku. Odpoledne je věnováno sportu, hrám, výletům, koupání ap. Strava pětikrát denně, pobyt je poměrně levný, protože táborníci v dobrovolné kázní si provádějí některé úkony sami. Žádejte bližší informace a přihlášky: Esperanto, p.s. 72, 674 01 Třebíč.

CHCETE-LI MIT své zprávy zveřejněny včas, dodržujte termíny uzavěrek našeho časopisu. Uvědomte si, že vzhledem k výrobní lhůtě uplyne od tohoto termínu ještě asi 5 - 6 týdnů, než STARTO dostanete do svých rukou. Termín pro č.2 je 6.dubna, pro č.3 8. července, č.4 16. srpna, č.5 28. září a č. 6 9. listopadu 1979.

■ PARDUBICE INVITAS VIN ■ ■ ■

Distrikta filio de Ĉs.Korpkultura Komitato (OV ĈSTV) en Pardubice - turisma sekcio - arangas la 24-an de junio sub la auspicio de la sociaj organizoj la VIII-an longdistancaj pacmarŝon "Zámeček - Ležáky" okaze de la 37a datreveno de la detruo de vilaĝo Ležáky.

KATEGORIO A - noktaj marŝoj je la distancoj 35 kaj 50 km. Prezentigi oni povas la 23.6. ĝis la 23a horo ĉe la monumento "Zámeček". Starto je la 0,00 horo 24.6.

KATEGORIO C - por biciklistoj - distancoj 60, 80, 120 km. Prezentigo la 24.6. je la 6,30 h. ĉe "Zámeček". Starto je la 8a horo. La veturo okazas en normala trafiko.

KATEGORIO M - veturcelo de mototuristoj en Žumberk la 24.6., kie estas prezentigo inter la 8a kaj 10a horo.

Aligilojn oni transdonu dum la prezentigo. Ĉiujn elspezojn rilate la mangadon, volagelspezojn ks. pagas la partoprenantoj mem. La monumento "Zámeček" estas atingebla de Trída míru per trolebuso n-ro 1 (Slovany - finstacio).

VĚDECKOTECHNICKÁ SEKCE ČES sdružuje zájemce o využívání Esperanta ve vědě a technice a také tuto činnost podporuje. Za základní cíl si vytkla sestavit odborné slovníky, vydávat odborné publikace, pořádat odborné přednášky, semináře a pod. jakož i pečovat o zvyšování odborně-jazykové úrovně svých členů. Proto se také snaží rozšiřovat okruh zájemců, uživatelů esperanta i spolupracovníků. Členové dostávají zdarma zpravodaj "STS informas", který bude od roku 1979 vydáván 2-4krát ročně. Zájemci o spolupráci v mezinárodním měřítku mohou sledovat několikastránkovou rubriku ve velmi hodnotném časopisu BUDAPEŠTÁ INFORMILO (12 čísel ročně za 25,- Kčs, - objednávky vyřizuje ČES Praha).

Do tisku se připravuje již první část technického slovníku česko-esperantského, dále ve druhé polovině roku 1979 vyjde první sešit populárně psané revue "SCIENGO KAJ TEKNIKO POPULARE", určené širokému okruhu čtenářů a poskytující možnost publikovat zejména mladým autorům.

Příhlášky do sekce přijímá a bližší informace podává: Ing. Dr. Ludvík FRITSCH, Gorkého ul. č. 11, 370 01 České Budějovice.

EN PITORESKA MEDIO okazos tradicia Turisma semajno en Slovaka Paradizo (TUSE-79) en la tagoj 11. - 17.8.1979. Logigo en turismaj domoj kaj kabanetoj en 3 - 6 litaj ĉambroj.

PROSPEKTON pri la urbo Lahti petu ĉe Lahden kaupungin matkailutoimisto, Kaupungintalo, 15100 LAHTI 10, Finnlando.

PAROLAS VARSOVIO

Pgla Radiŝo, Esperanto-redakcio, pk.46, 00-950 Varsovio, disaŭdigas ĉiutage en Esperanto!

5,00 h. ondolongoj: 41 m; 49 m; 75 m; 200 m.

15,30 h. ondolongoj: 31 m; 49 m.

21,30 h. ondolongoj: 41 m; 49 m; 75 m; 200 m.

Lunde: "Esperanto-ekspreso"; "Aŭskultantoj por aŭskultantoj".

Marĝe: "Aŭskultantoj por aŭskultantoj".

Ĵaŭde: "El la vivo de la Pola Esperanto-Asocio"; "Leterkesto".

Vendrede: "Leterkesto".

Sabate: "La semajno en Pollando"; "Panoramo de internaciaj eventoj"; "Esperanto-ekspreso".

Dimanĉe: "La semajno en Pollando"; "Panoramo de internaciaj eventoj"; "Esperanto-ekspreso".

RONDETA VIVO

BRNO - Publikan paroladon pri "Impresoj el la 63-a Universala E - Kongreso en Varna" prezentis la 14.12. en Klub ŝkolstvia a vědy B.V. en Brno prof. A. Růžičková-Pavličnová, aktorino el Teatro de Fratoj Mrštík. La parolado okazis en la ĉeĥa lingvo kaj pli ol 100 personoj aŭskultis kun granda intereso la carman rakontadon de la populara artistino. Plurajn aldonaĵn klarigojn prezentis J. Vondroušek.

Vesperon de gloraĵ monologoj far Eva Seemannová el Prago preparis EK la 31.10. 1978. La artisma prezento de la monologoj (Goneril de K. Capek, Ekskurso de mortintaj knabinoj de A. Seghers, El leteroj de B. Němcová) impresis, mirigis kaj dankemigis multnombrajn aŭskultantojn. La alia programo kun E. Seemannová estis interkonsentita por marto 1979.

Kurson de E-o ekde oktobro 1978 frekventas 14 personoj. Instruas J. Vondroušek.

La 12.1.1979 estis inauguraĵo en Klub ŝkolstvia vědy ekspozicio "Internacia lingvo en la nuntempo". La inauguraĵon ĉeestis direktorino de KSV B. Čapková, ĵurnalistoj kaj vizitantoj. Modele aranĝita ekspozicio ĝenerale placis, fluge estis raportite en ĝi pri ĉiuj atingajoj de la internacia lingvo. La ekspozicion vizitis malgraŭ karboferioj ĉ. 200 homoj.

En la legejo de Stata Scienca Biblioteko okazis la 24.1. per arango de Regiona Komisiono por Sciencaj, Teknikaj kaj Ekonomiaj Informoj ĉe Regiona Konsilantaro de CSVTS seminario "Perspektivo de planlingvo en scienco kaj tekniko". Parolis nia membro Ing. ark. Jan Werner. Sukcesan arangon partoprenis ĉ. 30 personoj.

ĈESKÁ TŘEBOVÁ - Vigla ER "Amikeco" aranĝis la 9an de februaro jam la 10-an Esperanto-balon. Tiu ĉi arango ĝuas grandan saton ĉe

la publiko, estas multnombre vizitataj kaj regule partoprenas ilin pluraj gesamideanoj el Aŭstrio, GDR, GFR, Hungario kaj Pollando.

F R Ý D E K - M Í S T E K
- La 19.11.1978 okazis parolado de A.Oulehla "Vizite en Tallin" kun koloraj diapozitivaj, en Kafejo Esperanto.

H A V L Í Ā K Ŭ V B R O D
- Jam la trian vintran sezonon okazadas ĉiumonate "vesperoj de poezio", kiujn aranĝas "Klubo de poezio-amikoj" kies fondon iniciatis E. Seemannová kaj helpis la ER. La januara vespero estis dediĉita al la poemoj de Jiří Karen, la poeto de "Vysočina". La aŭtoro konfesis antaŭ la sufiĉe nombra ceestantaro pri sia aparteno al Esperanto, kiu eĉ savis al li la vivon - en la tempo de la fifama nazia okupacio, kiam li devis sklav-labori en la tria regno.

(eto)

J A B L O N E C N. N. I. S.
- Nikolao-vesperon kun muziko, gaja kaj varia programo, donacoj, tombolo kaj dancado aranĝis la 2.12.1978 EK en granda salono de KASS je la 19,30 h.

K A R L O V Y V A R Y -
"Esperanto estas ne nur lingvo, sed ankaŭ la kraka metodo por interkomprenigo"- mesaĝas la novjara bulteno de la loka grupo de ĈEA en tiu ĉi banloka urbo. Ĝi rememorigas la naskigdatrevenon de V.I. Lenin kiel la unua senkompromisa batalanto por la lingva egalrajteco kaj la Zamenhofan jaron 1979.

P A R D U B I C E - Sabato la 7an de aprilo la grupo solenas sian 70an fondodatrevenon kun kultura kaj amuza programoj. Invitiloj

sendotaj al ĉiuj lokaj grupoj.

P L Z E Ň - La klubo solenas 75 jarojn de sia ekzistado; por la tagoj 1-a kaj 2-a de septembro 1979 estas preparata golena artisma programo. Aligilojn kaj mandoj, por tranoktado akceptas J. Vomáčka, Koterovská 32, 301 42 Plzeň. Limdato por aligoj la 31.5.1979.

P Ř E R O V - Kiel rezultas el la januara jarkunveno, grava parto de la klubo aktiveco estas partopreno de pluraj membroj en diversaj E-renkontigoj enlandaj kaj eksterlandaj, en seminarioj, konferencoj, laborkunvenoj. Por la bezono de Masinfabriko en Přerov, por Urba Nacia Komitato, Distrikta Packonsilantaro estas preparataj Esperantlingvaj tradukoj. Okazis kelkaj publikaj prelegoj kun diapozitivaj pri vizititaj landoj. La klubo havas 40 membrojn, 3 honorajn. La plej aĝa, daŭre aktiva, esperantisto de la j.1922, estas Alois Mazáč. Funkcias 3 kursoj, gvidataj de L. Chytil, J. Filip, L. Filipová.

(jt)

P Ř Í B O R - Ekde aŭtuno pasintjara agadas internacia klubo de lernantoj en la naujara lernejo, str. Jiřínská, en kiu instruas Esperanton M. Klauďová. Kune kun s-ro A. Satek ŝi aranĝis pagandan montrosrankon kun pacrilataj materialoj en Esperanto. En la librejo de la Kulturdomo ROH estis fondita la Esperanta fako, sekve de la librodonacoj de J. Čichová - Havránková el Prago. La klubo aranĝas kunvenojn kun prelegoj ankaŭ por la neesperantista publiko. La inter-

nacia lingvo estas populari-
gata inter la anoj de la di-
strikta packonsilantaro en
Nový Jičín.

T Á B O R - En "Tábor-
ský zpravodaj" aperas kon-
stante kolumno pri nia mova-
do kaj la internacia lingvo.
En la decembra n-ro estas
ampleksa kontribuaĵo de d-ro
Rytíř kaj Škorpil pri la u-
niversala kongreso sen in-
terpretistoj.

La 11.12.1978 estis aran-
gita "Rememora vespero pri
D-ro Zamenhof" kun samtempa
ekspozicio de Esperanta ga-
zetaĵo.

Z N O J M O - Publika
parolado kun diapozitivaj su-
veniroj kaj bildkartoj el
Kupo okazis la 25.1.1979. An-
taŭ multaj samideanoj kaj
ankau neesperantistoj parol-
is s-ino Fromlová kaj s-ro
Pučík, vizitintoj al tiu ci
lando.

)Lingva angulo(NAVAZUJEME STYKY

Ze zkušeností víme, že mezinárodní jazyk účinně pomáhá i navazování mezinárodních styků a přátelství. Jak zde překládáme výraz: "navazovat"?

Někteří uživatelé esperanta prostě používají výrazu ligi (vázat): ligi internaciajn rilatojn, amikecon. Např. T. Jung, redaktor Herolda: ekligi internacian amikecon. Ostatně i Zamenhof: ligi amikajn rilatojn kun iu, Kühnlův slovník: ekri-
lati kun iu, ekligi rilatojn, Plena vortaro (PV); ligi in-
terrilatojn kun, ale též teksti ...; vyjádření počínavosti
děje je zde tedy: ekteksti ... Seemann (slov.slovník): inter-
rilatigi. A tak i Hromadův slovník z roku 1961, na němž spo-
lupracovali dr. Pumpr a původce těchto řádků, přebírá termín
ligi (kontakton - styky, konecon - známost), ale dodává i
konatigi; analogicky je možné kontaktigi. Při tom Hromadův
slovník z roku 1949 užil: komenci rilati (rilatojn), starigi
kontakton, ekrilati.

V diskusi o termínu "ligi" náš esperantolog Pumpr projevil k němu nechuť. Důvod je nasnadě: výraz ligi by mohl být v naznačených spojeních chápán i jen ve svém základním výz-
namu: vázat, svázat, tedy i ve smyslu částečně negativním,
omezujícím. Srovnej: tio ligas niajn manojn - to nám svazuje
ruce, ve smyslu senmovigas. Z diskuse vyšel závěr: espe-
ranttější pro počínavost děje jsou způsoby s použitím před-
pony EK: ekkontakti kun iu per intimaĵ rilatoj - navázat s
někým důvěrné styky, nebo: intime (amike) ekkontakti, ekri-
lati. - Christaller (něm.-esp. slovník): Beziehungen anknup-
fen - ekinterrilati (al, kun). PV: ekrilati, rilatigi kun
iu.

EK je šikovné slůvko: ni ekkorespondis - navázali jsme ko-
respondenci; též: ni ekis korespondi - začali jsme si dopi-
sovat. A od toho už je jen krůček k termínu, který plně vy-
stihuje přenesený význam termínu "navázat": EKIGI. La kursa-

**projektas, produktas kaj muntas
ekipaĵojn por longdistanca**

*** bendtransporto en enteraj
minejoj**

**ekipaĵojn por deponeja mastrumado
plue ĝi elfaras levĉarojn kun flan-
ka ŝarĝeblo de portkapablo 5t
* kaj 6,3t kaj devirsspecajn pesi-
lojn**

noj ekigis viglan korespondadon - navázali ...; per Esperanto estas facile ekigi amikajn internaciajn kontaktojn (rilatojn).

S výrazem ekigi, aĉ zcela logickým, jsem se setkal v tisku poprvé v čas. "Esperanto" 9/1978, ve spojení s "korespondado". Aĉ PV registruje "ekigi" s příkladem (viz dále), PIV je opomíjí.

Ale ve větách: temas pri la ekigo de grava agado (PV); la komandanto ordonis ekigi persekutadojn de la malamiko .. odpovídá význam slovesa, zvláště v druhé větě, českému zahájit, započít.

Popsaný význam slova "navázati" je t.zv. přenesený význam. Musíme vědět, jak vyjádřit i základní význam toho slova. Navázati přetřžený provaz - religi dissiritan (ŝirigintan) ŝnuron; nodi, ŝnuron. Nod-ligado (navazování, zauzlování) de fadenoj senĉese ŝirigintaj (I. Rotkvič v "Cezaro", s.128). Známý Asen Grigorov použil nodi i v přeneseném smyslu: la amikoj renodis (znovunavázali) la interrompitajn kontaktojn.

Setkáme se i s dalším významovým odstínem slovesa navazovaj; vyjádříme to např. slovy reveni al, repreni, kontinuiĝi, daurigi, príp. i resendi. Příklady z literatury: navázal ve svém projevu na známou událost - li revenis en sia parolado al ...; necesas repreni la malnovan taskon - navázati na, príp. znovu se ujmout starého úkolu; ni kontinuiĝos la malnovan tradicion - naváŝeme na ..., príp. daurigos - budeme pokračovat ve ...

Nakonec připomínka k úvaze: přečtete si tyto řádky a zase zapomenete jejich obsah, jako obdobná poučení v minulých číslech. I původci těchto řádků by se určitě dalo podobně, kdyby si stále nepořizoval termínové poznámky a výpisky z tisku a literatury (ve smyslu poučky: všichni lidé všechno vědí), a to abecedně, aby byly kdykoliv ihned přístupné. Dá to fušku, ale vyplatí se to. Zájemce si sám vyřeší způsob provedení. Kdyby snad chtěl vědět, jak to dělá autor dole naznačený, budiž: odedávna si ostrou tužkou pořizuje drobné vpisky do svého česko-esperantského slovníku. Jsou jich tisíce a někde už nestačí prostor: tu vlepuje papírové vložky pro další vpisky. A termín nebo vazba, někdy velmi vhodné - jsou hned po ruce.

Jes ja: la granda ĉeĥa-Esperanta vortaro ankoraŭ ĉiam ekzistas sole en nia revo...

J.M.



Ĉia bildo montras la partoprenantojn de la MEM-konferenco okazinta pasintan novembro en Prago



Inter la urboj BRISZŃ (DDR) kaj PARBUICE estis antaŭ pli ol unu jaro vizita korespondado. Ĉiaraĵoj rakontas: antikvis per Esperanto kaj pasintare ili persone rakontis en ĉiara regiono probato de Esperanto en la kabanaro de M. Rilibrand. En oktobro 1978 la germanaj infanoj vizitis Parbuice.

internacia panoramo

FRANCIO - La 12a Internacia Renkontigo de Freinet-Edukistoj (RIDEF) estos en Landernau inter la 17a kaj 31a de julio. Dum la antaŭkongreso en la sama loko oni parolos precipe en Esperanto.

La turisma oficejo en Nancy ĵus eldonis novan 10paĝan ilustritan prospekton tute en Esperanto. Interesaĵoj povas ĝin ricevi senpage ĉe: Turisma Oficejo, 14, Place Stanislas, F 54000 Nancy.

HUNGARIO - Hungara Esperanto-Asocio faris decidon, ke en la plej proksima tempo estu fondita en ĉiu hungara urbo unu esperantista klubo.

ITALIO - Post propono de kvar italaj deputitoj, ke Esperanto estu akceptita kiel laborlingvo ĝe Europa Komunumo, ricevis Europa parlamento peticion de Esperanto-Centro, postulanta, ke la internacia lingvo estu enkondukita en lernojn de ĉiuj nau membraj ŝtatoj. La dokumento citas argumentojn ekonomiajn, politikajn, kulturajn, sociajn

kaj pedagogiajn. La parlamenta komisiono akceptis la proponon por la pritrakto kaj igis ĝin traduki en pliajn kvin lingvojn.

N E D E R L A N D O - En la vilago Austerlitz okazos en julio la 35-a Internacia Junulara Kongreso. La kongresa temo: "Interŝtataj unuigoj - kiucele?"

P O L L A N D O - La 7-a Studenta Interlingvistika Seminario okazos la 25 - 28an de aprilo en Varsovio. La organizanto estas Studenta Interlingvistika Rondo de la Altlerneja Konsilio de Socialisma Asocio de Polaj Studentoj de la Varsovia Universitato.

En kadro de kulturaj datrevenoj de Unesko oni rememoros batalanton por rajtoj de la infanoj J. Korozak, kiu en la dua mondmilito memvole iris en gaskameron en Treblinka, por ne forlasi "siajn" al morto kondamnitajn infanojn el la juda varsovia orfejo. Lia gazeto, unua por la infanoj en Pollando aperadis en Esperanto. Okaze de lia datreveno aperos en la internacia lingvo libro de A. Slazak.

Varsovia eldonejo Interpretos eldonis la faman romanon de H. Sienkiewicz "Tra dezerto kaj praarbaro" en la Esperanta traduko de prof. M. Sypnarski.

U N O - La unuan fojon parolis en Organizaĵo de Unuigintaj Nacioj prezidanto de UEA D-ro H. Tonkin pri la temo: Lingvo kaj la internacia komunikado. La paroladon enkondukis aŭstralia ambasadoro s-ro R. Harry, kiu mem esperantigis pliajn publikajojn de UN. La paroladon ceestis ankaŭ kelkaj diplomatoj kaj greka ambasadoro.



Per ĉiuj 25 vortoj vi pagos 15 Kčs aŭ 5 irpk. Abonantoj el eksterlando turnigu al viaj perantoj pri detalaj informoj!

W. Gaslov, 38j. laboristo, 50-205 Wroclaw, str. Cybulski 26-13, Pollando • V. T. Siškova, 23j., Ruse 7004, ul. Pliska, bl. Červen, vh. A., pk. 19, Bulgario • H. Najdénovová, Nouzov 286, 273 51 Unhošt, Kladno, CSSR • V. Strnad, Sehradice 62, 763 23 Ihoť u Luhačovic, CSSR • J. Nosál, 16j., 985 06 Utekáč, 62, CSSR • D. Bělašková, 17 j., Komenského 212/20, 541 00 Trutnov, CSSR • K. Hulvát, Leningradská 2390, 390 01 Tábor, CSSR • R. Kalojanova, komplekso Ljulín, str. 613-Petr Goranov, bl. 15-18, vh. 2, ap. 35, 1336 SOFIA, Bulgario.

• Korekto en la anonco pasintnumera: Fr. Szuba, St. Białka (anst. Białka) • Adressango: MUDr. V. Škoda, Lenínova 464, 664 51 Slapanice u Brna, CSSR • Plenan Ilustritan Vortaron acetos J. Lisý, Neumannova 48, 602 00 Brno.

• Eli URBANOVÁ, deputitino ĉe ONV Praha 8, en sia diskut-kontribuo ĉe plenkunsido de tiu Nacia Komitato, 13.12.1978, informis pri la valoro de Esperanto por la internacisma eduko de lernejanĵoj.

Petrochema

PRODUKTAS

- hejtmaterialojn, lubrikajn, elektroizolajn, malalt-solidiĝantajn kaj konservajn oleojn,
- sintezajn surface-aktivajn materialojn,
- medicinajn kaj kosmetikajn blankajn oleojn,
- emulsiajn prilaborajn likvaĵojn kaj tranĉ-oleojn,
- industriajn help-rimedojn

Informoj de:

Obchodno - technická služba

PETROCHEMA, n.p.

DUBOVÁ

976 97 Nemecká nad Hronom

Telefon: Podbrezová 8321-3 Telex: 070273



KRONIKO

■ La 3.10.1978 ĝievivis, en plena vigleco 75 jarojn de sia ago RNDr. Vlastislav ZÁZVORKA, CSc., internacie kónata paleontologo, direktoro de Nacia muzeo en Prago. Pri li laboraktiveco atestas, ke li emeritiĝis nur 1.1.1979, post preskaŭ 53-jara faka laboro! Ni kore gratulas al la jubileulo.

■ Doc. Vl. Novobilský fariĝis la 100-a dumviva membro de ĈEA. Ni gratulas!

■ La 12an de januaro geedziĝis Jarmila Urbišová kaj Daniel Pustka. Plue geedziĝis Marcela kaj Karel Madzia en Třinec kaj Anna Smolová kun Vladimír Smola en Vrchlabí. Gratulojn!

■ Forpasis en Prago Valdemar Řeger, la 12an de januaro aĝa 70 jarojn.

PETO EL VJETNAMIO

La vjetnamaj infanoj bezonas helpon en sia lerneja agado. Sendu al ili kajerojn por skribi, desegnopaperon, farbojn kaj ludilojn - cion por NHA VAN HOA THIEU NHI, infana Kulturdomo - PHO, NGO QUYEN, Hanoi, Vietnam.

PANORAMON pri la kvaronjarcenta agado de Mondpaca Esperantista Movado, pri ties historio kaj celoj prezentas broŝuro KONCIZE PRI M.E.M. - (1953 - 1978) eldonita, pentajare en Prago. (Aŭtoroj N. Aleksiev, W. Gilbert, O. Kníchal, S. Podkaminer). Mendebla ĉe ĈEA por 8,-- Kčs.

Dary svazu

B. Bulínová, Maříánské Lázně 20,-- Kčs; P. Čálek, Praha 2,-- Kčs; M. Čekal, Děčín 6,-- Kčs; B. Dorazilová, Myslibořice 50,-- Kčs; arch. Drlík, Praha 1,155,-- Kčs; L. Fiala, Poděbrady 2,-- Kčs; B. Grym, Petřvald 20,-- Kčs; Vl. Hasala, Valtice 3,-- Kčs; Dr. J. Hřib, Brno 1,-- Kčs; EK Jablonec n./N. 350,-- Kčs; J. Karen, Praha 2,-- Kčs; L. Klimeš, Praha 2,-- Kčs; Ing. R. Mach, Teplice 5,-- Kčs; St. Majer, Troubelice 2,-- Kčs; St. Marček, Martin 2,-- Kčs; EK Mšlník 3,-- Kčs; Fr. Mančík, Hor. Námč 30,-- Kčs; K. Novák, Svinařov 12,-- Kčs; Fr. Patera, Hořice 5,-- Kčs; MS Prostějov 6,-- Kčs; J. E. Ptok, Praha 8,50 Kčs; Mil. Rybča, Lipt. Mikuláš 5,-- Kčs; Mil. Rybín, Lipt. Mikuláš 9,-- Kčs; David Sláva, Pustějov 5,-- Kčs; SZK ROH, Roudnice 1,-- Kčs; Ing. Bl. Štefek, Polička 2,-- Kčs; J. Vondroušek, Brno 2,-- Kčs.

Anonco por esperantisto;

Ankaŭ ĉijare povos tre malmultekoste unu ĝis kvin personoj agrable refresigi inter junio kaj septembro en du ĉambroj de gardena vilao, proksimume 600 m de la fama valbaraĵo Seč sur la rivero Chrudimka. Mangado en proksimaj restoracioj aŭ memstara kuirado en complete ekipita kuirrejo.

ATENTIGO: Por konfirmi vian alvendon bonvolu sendi ĝustetempе аfrankitan koverton al: Ladislav MRAZEK, Gagari nova 378/10, 530 09 Pardubice.

ESKPOZICIO

okaze de la INTERNACIA JARO DE INFANO

La klubo "AGORA" en Bydgoszcz aranĝas okaze de la INTERNACIA JARO DE INFANO internacian ekspozicion de la infanaj desegnaĵoj pri la temo "M I A M O N D O".

Infanoj de la tuta mondo estas petataj sendi la desegnaĵojn ĝis la 15-a de majo 1979 al: Klubo "AGORA", str. M. Skłodowskiej-Curie 56, PL 85-088 Bydgoszcz, POLLANDO.

Infanoj, kiuj sendos la desegnaĵojn pri la temo "MIA MONDO" ricevos esperantlingvan albumon pri d-ro Janusz Korczak - la GRANDA AMIKO DE INFANOJ.

ANONCENTO

Por prilaborata bibliografio de sciencaj artikoloj en Esperanto, ĉiuspecajn revuojn, periodaĵojn kaj kolektivajn verkojn kun sciencaj artikoloj en Esperanto, serĉas Edward WOJTAKOWSKI, P.O.Kesto 312, PL 50-950, WROCŁAW 2, Pollando.

GAZETARA SPEGULO

UČITELSKÉ NOVINY, n-ro 6/1979, publikigis ampleksan raporton, kun fotoj, pri la eduka laboro de nia membrino Eli URBANOVÁ kaj pri ŝia perkaj poresperanta laboro en lernejo (Praha 8). La redaktorino Raziňová substrekas, ke ŝiaj poemoj aperis tradukitaj jam en 5 fremdaj lingvoj. UNESCO envicigis ŝin en sian kalendaron de kulturdatrevenoj.

jm

"BUDAPEŠTA INFORMILO"(11/1978) dediĉis preskaŭ tutan paĝon al rememoro (kun versoj de J. Kořínek) pri d-ro Stanislav Kamarýt (1883-1956) okaze de lia 95a naskigdatreveno.

KOLEKCIION DE FOTOJ el 3-a kongreso de ĈEA vi povas mendii rekte ĉe: Milan LABAŠTA, Újezd 34, 118 00 Praha 1. Fotokolekcio enhavas sume 15 fotojn 13x18 cm. Prezo 50,- Kčs inkluzivas sendkostojn.

INFORMOJ DE SEKRETARIO

◆◆◆◆◆ LA 64-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO ◆◆◆◆◆

◆ ◆ EN LUCERNO, 28.7. - 4.8.1979, SVISLANDO ◆ ◆

Nia asocio kunlabore kun la vojaĝoficejo "ĈEDOK" preparas karavagnon por la 64-a UK en Lucerno. Tiukaze oni vizitos ankaŭ Aŭstrion, Esperantan Muzeon en Vieno.

Ni forveturos vagonare la 26.7. La vojaĝo daŭros 12 tagojn, prezoj inkluzivas tranoktojn, mangaĵojn kaj posmanĝon. Oni kalkulas, ke la prezo estos relative alta, ĉirkaŭ 10 000 kronoj. Nombro estas limigita por 20 personoj - pro valutaj kaŭzoj.

Pluajn interesitojn ni bedaŭrinde jam ne povas akcepti. Estroj de lokaj grupoj scias pri karavano jam pli ol 3 monatojn.

Kongreskotizoj validaj ĝis la dato:	78.12.31	79.03.31	79.06.16	79.08.04
periodo:	unua	dua	tria	kongresa
1. Kongresano ne membro individua de UEA	gld. svfr. 165 150	gld. svfr. 182 165	gld. svfr. 198 180	svfr. 210
2. Kongresano individua membro de UEA kun Jarlibro	143 127	160 142	176 157	187
3. Kongresano individua membro de UEA kun Jarlibro kaj revuo "Esperanto"	110 92	127 107	143 122	152
4. Edz(in)o de kongresano en kategorio 1.	115 105	127 115	137 126	156
5. Edz(in)o de kongresano en kategorio 2. aŭ 3.	100 89	112 99	124 110	140
6. Junulo ĝis inkluzive 20-jara	50 45	55 50	60 55	85
7. Plentempa studento ĝis inkluzive 30-jara	82 75	91 83	99 90	120
8. Blindulo	66 60	73 66	79 72	102

◆◆◆◆◆ ASOCIO DE SOVETAJ ESPERANTISTOJ ◆◆◆◆◆

Meze de marto, kiel ni eksciis el bone informitaj fontoj el Sovetunio, estis fondita Asocio de sovetaĵ esperantistoj. Ni kredas, ke vi ĉiuj amase gratulos al tiu ĉi okazo al viaj sovetaĵ geamikoj. Ni kredas je tre bona kaj fruktodona kunlaboro, kiu ambaŭflanke helpas al plifortigo de niaj eblecoj.

Kiel prezidanto de la asocio estis proponita M. Isaev.

◆◆◆◆◆ TURISMAJ EKSKURSOJ ◆◆◆◆◆

Kunlabore kun Pola Esperanto-Asocio ni preparis por vi kelke da turismaj ekskursoj al interesaj arangoj en Pollando. Temaĵ pri sendevizaj intersangoj de unuopuloj kaj grupoj. Aligu laŭ la elektita termino kaj ni garantios vian partoprenon. Vojaĝkostojn vi pagos mem laŭ via elekto, restadelspezojn al la asocia konto. En tiu ĉi sumo vi havas pagi-tajn tranoktojn en hotelo kun trifoja mangajo, partopreno en kultur-turismaj arangoj kaj aliajn servojn laŭ la karaktero de la ekskurso.

Rimarkigo "kun ĉevaloj" signifas eblecon partopreni la instruadon pri rajdado sur ĉevaloj teorie kaj praktike sub la gvido de spertuloj. Duonon da sumo vi sendu tuj kun la aligilo, la reston vi devas pagi minimume 30 tagojn antaŭ komenco de la ekskurso. Vojaĝbiletojn la asocio ne prizorgas.

Dato de ekskurso: L o k o ; Nomo de ekskurso: Prezo en Kčs:

05.05. - 19.05.	Zakopane	Printempa E-feriado	1.700,--
20.05. - 26.05.	Mielno	5a Ĉebalta E-feriado	950,--
26.05. - 30.05.	Gdansk	Internacia E-feriado	710,--

DŮM MÓDY
PRAHA

středisko
kultury odívání

slouží

elegantním
ženám

moderním
mužům



30.05. - 03.06.	Bydgoszcz	4a Internacia E-renkontiĝo	470,--
04.06. - 09.06.	Bjalystok Warszawa	Bjalistoka E-Printempo	850,--
10.06. - 17.06.	Bydgoszcz	E-Feriado (kun ĉevaloj)	710,-- / 1.270,--
17.06. - 24.06.	Bydgoszcz	E-Feriado (kun ĉevaloj)	710,-- / 1.270,--
24.06. - 01.07.	Bydgoszcz	E-Feriado (kun ĉevaloj)	710,-- / 1.270,--
01.07. - 08.07.	Bydgoszcz	E-Feriado (kun ĉevaloj)	710,-- / 1.270,--
08.07. - 15.07.	Bydgoszcz	E-Feriado (kun ĉevaloj)	710,-- / 1.270,--
15.07. - 22.07.	Bydgoszcz	E-Feriado (kun ĉevaloj)	710,-- / 1.270,--
15.06. - 26.06.	Miedzygorze	Int. E-Feriado	2.170,--
31.07. - 13.08.	Wladislawowo	Somera E-Lernejo	1.700,--
13.08. - 26.08.	Wladislawowo	Somera E-Lernejo	1.700,--
03.09. - 16.09.	Miedzygorze	XV. Int. E-Feriado	1.980,--
26.11. - 02.12.	Warszawa Bydgoszcz	XX. Kongreso de PEA kaj V. Int. Foiro de E-Turismo	1.130,--

La prezo por ekskurso "kun ĉevaloj" estas 1.270,- Kcs, sen instruado pri rajdado nur 710,- Kcs. Per via partopreno kaj aligo de ni, vi ebligas, ke ankaŭ la polaj esperantistoj povas partopreni niajn aranĝojn!

◆◆◆◆◆ ĈU VI JAM PAGIS ASOCIAN KOTIZON? ◆◆◆◆◆

Ĉiuj, kiuj ĝis nun ne pagis sian asocian kotizon por la jaro 1979 estas petataj fari tion rapide. Tiu ĉi numero de STARTO estas la lasta, kiun vi ricevas ne renovigante vian membrecon!

◆◆◆◆◆ NOVA ESPERANTO-KLUBO EN PRAGO ◆◆◆◆◆

En Prago estos fondita plua Esperanto-Klubo ĉe fabriko Tesla. Ĉiu, kiu interesiĝas pri laboro kaj membrigi al tiu ĉi klubo sen pagi la kluban kotizon, nur la asocian, demandu en la sekretariejo. Kiel oni supozas, ĝi estos ĉefe klubo de junularo, kvankam estas invitataj ĉiuj, kiuj volas helpi.

◆◆◆ LA KULTURA ALMANAKO PANORAMO ◆◆◆◆◆

Baldaŭ eldoniĝos la nova kajero de kultura almanako PANORAMO. En ĝi vi povos legi i.a. fragmentojn el la esp. traduko de la fama Raporto de Julius Fucik. Ĉiuj, kiuj interesiĝas pri tiuj ĉi kajero entenanta la tradukojn de Rudolf Hromada, povas ĝin antaŭmendi en nia sekretariejo. Legantoj de STARTO, kiuj ĝin ricevas de niaj perantoj, ricevos Panoramon senpage. La aliaj povas mendi kaj pagi per 5 irpk (inkluzive de postelspezo) por unu ekzemplero.

◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆ GLUMARKOJ KAJ STOFINSIGNOJ EN NIA STOKO ◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆

ĈEA preparas por vi seriojn de diverspecaj glumarkoj, kiuj propagadas Esperanton. Aparte ni eldonas por interesitoj specialajn PLURKOLORAJN STOFINSIGNOJN, kiujn eblas per varma glatigilo kunigi kun la ledaj, stofaj kaj paperaĵ materialoj - tio signifas, ke vi mem povos ornami ekzemple propagandajn trikotĉemizojn, ĉapojn, sakojn k.s.

◆◆◆ DENOVE "ABC" KAJ "808 PLEJ UZATAJ VORTOJ" ◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆

Nia asocio kunlabore kun la loka grupo en Třebíč eldonos denove:

- konatan lernolibron de T. Kilian: ABC de Internacia Lingvo Esperanto,
- malgrandan vortareton "808 de plej uzataj vortoj", ankaŭ de T. Kilian, kies memoron ni volas tiamaniere honorigi.


Ambaŭ broŝuretojn bonvolu mendi tuj ĉe ni. Mendante pli grandan kvanton la grupoj ricevas kutiman rabaton.

◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆ PRINTEMPA ASOCIA OFERTO ◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆

Ni proponas el nia stoko kalendarojn kaj krome por la kurenta jaro (formato A3 - surmura), ankaŭ "konstantan ŝoveblan". Kalendaroj kun Esp. teksto estas plurkoloraj. La unua kostas 4,-- Kčs, la dua 7,-- Kčs. Estus bone, se vi mendus kolektive - pro la poŝtelspezoj kaj komplika pakado.

INTERESAJ TITOLOJ VENDEBLAJ:

Endre Ady (poemareto)	6,--	Kĉs
V. Damjanov kantas en Esperanto (stereogramodisko)	44,--	"
Cink: Ekzercaro por progresintoj	15,--	"
E-o por junularaj feriadoj (lernolibro)	7,--	"
Estonia soveta poezio	8,--	"
Fina akto	5,--	"
Hasanagaino	6,--	"
Hejmo de la franca arto en Prago	3,--	"
Historio kaj biografioj	6,--	"
Kantareto 1978 (eld. EK La Progreso, Ĉes. Budějovice)	6,--	"
Kanto super lulilo (malgranda slovaka antologio)	4,--	"
Kantu kun Anda el Bielice	5,--	"
Koko krias jam! (hungara eldono)	39,--	"
Kolora kaleidoskopo (Panoramo 1978)	16,--	"
Komenio kaj la internacia lingvo	4,--	"
Koncize pri MEM	8,--	"
Lernolibro KILLIAN	18,50	"
Lernolibro Satura-Rosa (slovaka eldono)	16,50	"
Lumo de orienta Europo	5,50	"
La mastro de Korboja	5,--	"
Nuda inter lupoj (romano - bindita)	38,--	"
La perdita vizago	15,--	"
Poŝatlaso de la mondo	20,--	"
Praktika kurso de E-o, IIa semestro (Esp.-pola)	16,--	"



HARMANECKÉ PAPÍRNY

Paperfarejo
en Harmanec

PREMITO PER LA ORDENO
DE RUĜA STELO, LABOR-ORDENO
KAJ DATRAVENO DE 30 JAROJ DE SNR.

PRODUKTAS ĈIUJN SPECOJN DE GRAFIKAJ PAPE-
ROJ, FILTRAJN PAPEROJN KAJ TABULOJN, PAPER -
PRODUKTOJN KAJ HIGIENAJN PRODUKTOJN.

NI EKSPORTAS EN 46 ŜTATOJ - DE LA MONDO.

Okresní podnik služeb
CHOMUTOV



**NABÍZEJÍ VOLNOU KAPACITU
V BARVENÍ**

textilu, košil a silonových záclon
objednávky vyřídíme na dobírku
zašleme jednotlivcům i organiza-
čním služeb